

N°170
avril
mai
juin
2015

LA INFORMILO

N° 170
aprilo
majo
junio
2015

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières



Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

“Philippe Desforges”

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO


Papera versio: 15€

Reta abono: 7,50€



Ce 9 mai 2015 le Parlement Européen de Strasbourg ouvrait ses portes au public ! À un très nombreux public français et allemand ! Et l'espéranto était présent ! Le stand de Strasbourg-Espéranto était bien visible à l'entrée, après l'accueil des visiteurs. Et les questions ne manquaient pas et exigeaient des réponses en français, allemand et anglais. Autant dire que nos infatigables militants (Bertrand Wick, Jean-François Schwaiger, Arnaud Guerber) avaient fort à faire pour renseigner les nombreux visiteurs qui repassaient d'ailleurs devant le stand en ressortant ! Oui, oui, mesdames et messieurs, elle fonctionne, la Langue Internationale!!!





**77a Regiona Staĝo
de Esperanto
la 3-6ajn de aprilo 2015**

esperanto
France-Est

**en Collège Saint-Jean
73 rue de Blâmont, 55100 VERDUN**

Renkonto en Verdun (3-4-5-6 ajn de aprilo 2015)

Estis planita granda renkonto inter Sat-amikaro kaj la regiona asocio EFest.

Pro la konkurenco de la kanto-staĝo en Gresillon, multaj sat-amikaranoj rezignis pri Verdun, kaj venis nur 9 da ili. De Efest kaj Germanujo venis 20 personoj.

Entute ni estis 29.

Pro la malgranda nombro, ni ne ĝuis manĝo-servon de la lernejo, kie ni dormis, kaj ni devis ŝanĝi lastmomente nian organizon.

Ni plurfoje devis manĝi en Cora aŭ en restoracio, matene ni devis elturniĝi kun la materialo kaj varoj alportitaj de Catherine Kremer; lavi niajn manĝilarojn, ktp. . .

De tio rezultis, ke ni estis kvazaŭ familio kaj la etoso ĉirkaŭ la granda tablo estis ege frateca.

Mankis nenio, nek la ekskursoj kun efika interesa gvidantino Catherine Kremer, nek la kursoj, inkluzive por du komencantoj, nek diskut-rondo kaj prelego kun Rodica Todor, nek aliaj fare de SAT-Amikaranoj, ni eĉ havis du libro-servojn kaj ĝuis agrablan koncerton de Guillaume Armide.

Kion peti plu? Eĉ la prezo por dormi en la lernejo estis tute alloga: 10 eŭroj por ĉiu nokto. Resume, tre sukcesa staĝo.



Ginette MARTIN

Skribas Catherine Hel

Mia staĝo de Esperanto en Verdun

Fine de la vendreda posttagmezo, je la 3-a de aprilo 2015, blanka aŭto trankvile veturis al *Verdun*, kie estis okazanta la 77-a Regiona Staĝo.

En la aŭto, ni estis tri inaj membroj el la klubo de Nancy -Liliane la ŝoforino, Micheline kaj mi-, kaj kiel kutime tiuj Esperanto-renkontiĝoj ege bonhumorigis nin. Ekzemple per laŭtaj ridoj ni gaje primokis la nenaturan viran voĉon elirantan el GPS-o, nia navigilo (tutmonda loktrova sistemo), kaj eĉ ekminacis virinigi ĝin.

La voĉo estis iom mokata de ni, tamen dank' al ĉi tiu helpilo la staĝejon ni facile trovis. La ejo estas belega malnova domo, kiu nuntempe estas gimnazio (*Collège St-Jean*), kaj datiĝas de la 18-a jarcento. Kun ega rideto la organizantino de la staĝo, Catherine Kremer, nin bonvenigis. Sed malgraŭ la afabla rideto, ŝi ne estis tute ĝoja, ĉar iaj problemoj pri la aranĝo de la staĝo ŝin ĉagrenis. Ni do provis iom rekuraĝigi ŝin, kaj proponis al nia amikino helpon se necese.

Poste ni kune eniris la servistejan ĉambron, uzatan kiel akceptejo por la staĝo, kaj kie jam ĉeestis dekego da Esperantistoj ĉirkaŭantaj longan tablon. Kelkajn el ili mi ne konis, sed la plejparton --el Germanujo, Belgujo kaj Francujo-- mi jam vidis en aliaj Esperanto-staĝoj.



"Bonjour!" diris mi. Salutis min ĉiuj, sed kelkaj kun eta rideto ĉe buŝangulo. "Kia stultulo mi estas!", mi tuj pensis. Ĉiufoje estas same, multajn malfacilaĵojn mi havas por transiri de la franca lingvo al Esperanto. Kaj la samo okazadis ankaŭ ĉe la mantenmanĝo, mia duondormanta cerbo ofte miksis francajn kaj Esperantajn vortojn.

Ĉi tiu troviĝo vere varmigis la koron, ĉar la ĉeestantoj estis ĝojaj nin retrovi, eĉ min. Mi skribas "eĉ min", ĉar ĝis nun, pro mia anko-

raŭ ne sufiĉe bona nivelo de la lingvo-uzo, mi ne multe interŝanĝis parole kun aliaj staĝintoj. Tamen tiam des pli varma estis ilia bonvenigo al mi. Post multaj salutoj, kisetoj, manpremoj, nun teo, kafo, kaj kuktranĉaĵoj estis proponataj al ni.

Kiujn mi ne konis, estis anoj el asocio SAT-Amikaro. Ili "kongresis" dum ni staĝis. Mia opinio estas bona ideo kunveni samtempe kaj samloke du malsamajn asociojn, ĉar tiel oni povas renkonti aliajn Esperantistojn, ĝui komunajn programerojn, kaj eble ankaŭ dividi iajn elspezojn. Bedaŭrinde en la nuna renkontiĝo, pro neatendita manko de partoprenantoj, ŝajnis ke la afero ne tiom bone funkciis, kiom Catherine antaŭplanis.

Atendante la prezidanton de nia Nancia klubo, Jean-Luc, kiu estas ankaŭ libroservisto, ni kvarope kun Catherine pretigis grandan klasĉambron translokigante seĝojn al muro, kaj vicigante kvardekon da skribotabloj meze de la ĉambrego por la prezento de almenaŭ 700 diversaj titoloj de libroj kaj diskoj, kaj ankaŭ de la pli modesta libroservo de SAT-amikaro.

Poste, sekvis unu el plej gravaj faroj de ĉiuj Esperantistoj, nome: la manĝoj! Antaŭ tri jaroj, kiam mi komencis partopreni staĝojn, la "bona apetito" de samideanoj, eĉ ĉe maljunuloj, multe mirigis min. Malkovrinte miavice plezurojn de la tablo, nun mi ŝatas kunmanĝi kun ĉiuj, samkiel iuj ajn Esperantistoj. Do, malsataj kvazaŭ lupoj, ni ekiris direkte al memserva restoracio troviĝanta iomete pli for de la staĝejo por vespermanĝi. Dum la daŭro de la staĝo ni ankaŭ tagmanĝis tie, kaj en la servisteca ĉambro de la gimnazio, ni nur matenmanĝis kaj knajpis. En tiuj vesperaj retroviĝoj, pluraj facile drinkis bierojn kaj eĉ foje brandon. Ne havante sufiĉe fortan organismon por tiaj trinkaĵoj, mi ĉiam kontentiĝis per digestigaj varmaj infuzaĵoj. Tamen pro la amikiga etoso, la kunaj tagfinaj rendevuoj allogis la plejparton el ni.



Verdun. Komence, kaj sub kontinua pluvo, ni transpaŝis ponton, kiu superas la riveron Mozo (*La Meuse*), trairis la pordegon *La Chaussée de la 14-a jarcento* --simbolo de la urbo--, kaj direktiĝis al la katedralo "Notre-Dame

de Verdun" de la 10-a jarcento. Poste ni haltis antaŭ "Tutmonda Centro por Paco" (Centre Mondial pour la Paix), kaj malsupreniris la ŝtuparegon de "Monumento de la Venko" (*Monument de la Victoire*), kaj ni vidis ankaŭ kelkajn aliajn malnovaĵojn. La vizitado estis gvidata de Catherine, kiu estas profesia ĉiĉeronino en la regiono, kaj dank' al ŝi ni ĝuis spertajn klarigojn en Esperanto.

Jam de kelka tempo mi plurfoje ekaŭdis Liliane'on pri ŝia sento de malsato. "Mi malsatas!", ŝi ripetis. Ankaŭ mia stomako pli kaj



Estis la horo, ke ni iru dormi. Antaŭ jam momento, ni apenaŭ povis teni la okulojn malfermitaj. Vojaĝo, renkontiĝo, instaliĝo, peza vespermanĝo, kaj varmiga knajpo multe lacigis nin. Kelkaj surloke dormis, kaj aliaj eliris el la gimnazio por tranokti en proksima hotelo.

Sabate matene, post la mantenmanĝo, ni iris viziti malnovajn kvartalojn de *Ver-*



pli grumbletis, kaj pro la senĉesa malvarma pluvo, piedoj kaj manoj frostiĝetis. Estis do la tempo por ĉiuj preni la tagmanĝon, por ke la fortodona manĝaĵo ebligu al la staĝantoj daŭrigi la sekvon de la ĉitaga programo.

La sabata posttagmezo estis dediĉita al la lernado de nia lingvo, kaj unuafoje mi elektis la pli altnivelan kurson. Ĝi estis gvidata de Rodica Todor el Rumanio, kaj ŝi tiel bonege elparolis Esperanton, ke la kurson mi sufiĉe facile komprenis. Espereble, ke en venonta staĝo ankaŭ same bone mi kapablos en la parolata parto. La temo de la diskuto estis pri kaŭzoj de la daŭra agresemo ĉe homoj. Tiu interesa temo multe paroligis, kaj eble ankaŭ multe pensigis la staĝanojn.

Por la distra vespero estis invitata Gijom Armide, kiu kantis agrable memverkitajn kanzonojn akompane de sia elektronika piano. La harmoniaj sonoj malstreĉis menson kaj muskolojn de la ĉeestantoj lacaj post agadoplena tago. Mi eĉ ekvidis la kapon el du gespektantoj balanciĝi, unu antaŭen, kaj la alia malantaŭen. Ankaŭ la kantisto ekrimarkis tiujn, tial li ŝerce proponis kanti pli rapide, por ke baldaŭ ili dormu enlite. Ĉi tiu ĝusta interrompeto revigligis kelkajn ĉifoje ĝis la fino de la koncerto, kaj amuzis ĉiujn.



Por nia lasta dimanĉa tagmanĝo, Catherine mirinde sukcesis trovi antaŭtage bonegan restoracion en Verdun, kiu konsentis akcepti nin -- tiam ni estis ĉirkaŭ trideko da

partoprenantoj-- kaj prepari altkvalitajn pladojn por vere malgranda prezo.

La staĝo finiĝis per vizito al batalejoj apud Verdun, kie okazis teruraj bataloj inter franca kaj germana armeoj dum la unua mondmilito. En tiu loko naŭ vilaĝoj estis tute detruitaj, kiel ekzemple la vilaĝo *Fleury-devant-Douaumont*. La dekmonata batalo kaŭzis pli da 700 000 mortintoj kaj vunditoj de ambaŭ armeoj por neniu milita rezulto. La grupo daŭrigis la viziton al ostejo *Douaumont*, kaj vizitis fortikaĵon *Vaux*, denove kun la ĉiĉeronado de Catherine en la internacia lingvo.

Venis la fino. Malgraŭ pluraj malfacilaĵoj, la organizantino sukcesis elturniĝi, kaj finfine la tritaga staĝo disvolviĝis en amika kaj gaja etoso. La lokaj vizitoj estis ankaŭ ege interesaj dank' al ŝia senhalta laboro. Estu gratulata, kaj sincere dankata Catherine!

Ni tri samklubaninoj elkore adiaŭis ĉiujn, kaj baldaŭ ni enaŭtiĝis por reveni hejmen. Survoje aŭdiĝis la vira voĉo el la navigilo, sed malgraŭ niaj multaj instigoj, ĝi bedaŭrinde ankoraŭ ne sukcesis paroli Esperante.



Raportis Catherine Hel

La 31-a PSI

en Winterberg, Saĝis, 10-a de aprilo 2015

La 31-a PSI en WINTERBERG

La Pasko-semajno okazis en Germanio de la 3-a ĝis la 10-a de aprilo 2015 en la mezmontara "Sauerland" - regiono en la pitoreska urbeto Winterberg, kiu enhavas ĉirkaŭ 13 000 enloĝantojn. En la malnova centro oni povas vidi kelkajn domojn en trabfaka stilo. Okulfrapis domoj komplete kovritaj per ardezaĵaj tabuloj diversmaniere kombinitaj. La regiono estas ŝatata pro vintraj sportoj, kion ni povis sperti. Estis ankoraŭ sufiĉe da neĝo por profiti ĝin por diversaj ludoj kaj kreado de blanka paska leporeto.



La aranĝon partoprenis 130 geesperantistoj el deko da landoj inter kiuj multaj familioj kun infanoj de ĉiuj aĝoj. Ili tre ĝuis la renkontiĝon. La plej juna estis nur kelkmonata. Etuloj ĝuis ludadon, spektis Mazi-filmon, aŭskultis piĝamajn rakontojn kaj kreis diversajn artaĵojn. La pli grandaj kolorigis T-ĉemizojn kaj ludis tablotenis. La libroservo ofertis ampleksan elekton da diversaj libroj kaj aliajn esperantaĵojn. Eblis profiti saŭnon kaj lui biciklojn. Trinkejo ofertis diversspecajn



bierojn, vinojn, aliajn trinkaĵojn kaj dolĉaĵojn.

Okazis kelkaj E-kursoj, gimnastikoj, sportoj kaj interesaj prelegoj. Inter kiuj menciindas kulturo de daŭripovo, unikodo, origamio, poŝtranĉilo. Evoluiga projekto





ki "Zumbon". Junuloj havis sian programon, kiu konsistis el kaosludo, turniroj kaj ĉefe el filmo-prezentoj en 2 ĝis 4 dimensioj. Ne mankis paskaj ovoserĉado kaj vespera fajro, kion ĝuis ĉefe la infanoj. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjui kelkajn partoprenantojn



profitis belan sunan veteron por arbaraj piedpromenadoj kaj kelkaj biciklantoj malkovris vastan ĉirkaŭaĵon.

Vesperoj estis animitaj per diversaj ludoj. Ni ĝuis bingon, pupspektaklon, familian duelon inspiritan laŭ televida ludelsendo. Tre aprezata estis vespera koncerto de klasika ĵazo prezentita de Frank Selten kaj liaj amikoj. La internacia vespe-



en Etiopio, raportoj pri Himalajo kaj Hindio estis akompanataj per interesaj bildoj. La partoprenantoj interesiĝis pri enkonduko al la japana lingvo, historia vivmaniero en Litovio, okazaĵoj en nuna Ukrainio kaj ukrainaj kantoj. Estis donitaj klarigoj pri la memmasaĝo, "Yumeiho" kaj kolor-terapioj. Ni akiris informojn pri la Reta Vortaro.

Interesis kurso pri karateo kaj eblis ĉeesti ĉiutagan fizikan ekzercadon

Ĉigongo kaj praktiki

kaj poste aperis artikoloj en lokaj ĵurnaloj.




Kutimaj posttagmezaj ekskursoj gvidis nin al urbogvidado, al Parko de eŭropaj bizonoj, ercminejo Ramsbeck, al amuzparko "Fort Fun". Interesa estis ekskurso al la proksima urbeto Eversberg, kie ni vizitis interesan endoman muzeon. Krome ni vizitis urbetojn Oberkirch, Hallenberg kaj Medebach. Multaj



ro konsistis el kontribuoj de la partoprenantoj. Ni spektis kanton de la plej malgrandaj infanoj, anekdotojn, kantojn en ukraina kaj esperanto-lingvoj, gitar-, violon- kaj harpo-ludadon. Ĉe la fino oni dankis al ĉiuj kunhelpantoj kaj kontribuintoj al la sukcesa programo. La venontjara PSI okazos en Bad Hersfeld de la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo.

Liba Gabalda

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
avant la fin de chaque trimestre		
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asseseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	ginettepineda@numericable.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net	

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Plurilinguismo	13. Bavelo
2. Staĝo en Verdun	14. Renkontiĝo en mezoriento
3. Staĝo en Verdun	15. Kongreso en Hispanio
4. Staĝo en Verdun	16. Humuraĵo
5. PSI	17. Ni lernu per distraĵoj
6. PSI	18. IFEF- kongreso
7. Komitatanoj kaj menuo	19. Turismado en Rumanio
8. Angulo de la prezidanto	20. Turismado en Rumanio
9. Kanzono-tago	21. Turismado en Rumanio
10. Nova urbo	22. Vojaĝo tra Irano
11. Nova urbo	23. Vojaĝo tra Irano
12. Bavelo	24. Nia fototeko el Ĉinio

ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i>

Angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,



Ege sukcesis la tut-urba aranĝo "Majo de Eŭropo" organizita de la urbestro de Nancy en la luksaj historiaj salonoj de la urbodomo. Pri la esperantlingvaj eroj de la programo skipe bonege laboris la grupanoj de Nancy, aŭ per deĵorado en la budaro de la akceptohalo, aŭ dum la prezento de la partnera urbo Lublino prezentita en Esperanto de la gastparolinto Stanislas Rybicki: pro urĝa operacio la antaŭvidita Tomasz Chmielik ne povis veni. La franclingvan prezenton majstre prizorgis Jean-Luc Thibias. Dua prelego same interese disvolviĝis: prezentis en la franca lingvo la rolon de Esperanto dum la Unua Mondmilito nia eksa federaciano Emmanuel Desbrières. Ĉi-temajn panelojn kreitajn de UFE kaj reproduktitajn de Gisèle Bertapelle la vizitintoj povis pristudi en la Esperanto-budo.

Agrable disvolviĝis la Ĝenerala Membrokunveno de EFE en la Maison de l'Asnée, en Villers-lès-Nancy. Kora danko iru al la samideanoj, kiuj ne povis partopreni, sed kiuj fidele sendis al ni rajtigilon.

Vi ne miros, se mi anoncas al vi, ke ne "svarmis" la kandidatoj por la prezidanteco! Mi do akceptis pludeĵori kun mia skipo. Sed estus agrable, se novaj fortoj kun novaj ideoj sin prezentus!

Cetere: eble io ne plaĉas en nia agadmaniero, ĉar ni konstatas, ke pluraj lokaj grupoj, kiuj ja efike laboras, ne ĉiam informas nin pri siaj sukcesaj aranĝoj. Ni ja neniel deziras enmiksiĝi en iliajn agadmanierojn, sed ni ĝojus, se ni ricevus informojn, kiujn ni povus disvastigi pere de nia revuo LA INFORMILO aŭ per nia dissendolisto Alzaco-Loreno@yahoogroupes.fr. Dankon, se iuj membroj de tiuj ĉi grupoj pluinformus pri nia bedaŭro la aliajn grupanojn.

Edmond LUDWIG



Nia renovigita librolisto!
Klaku sur
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr/> poste sur
Nia Libro-servo
kaj mendu!
La libroj vin atendas en
via leter-kesto!

Eblas mendi
ekzempleron ĉe nia
kasisto je 2 eŭroj
inkluzive kun send-
kostoj.

Sylvie REFF, fama nuntempa elzasa poetino, verkis en siaregiona elzasa dialekto rakonton titolitan Der Zopf (La harplektaĵo). Jen la komenciĝo de la rakonto. La kovrilpaĝan ilustraĵon realigis nia samideano Armand HUBERT.

Jen rakonto pri mia najbarino 87-jara kamparanino 7 gefiloj, forpasinta edzo, kuirejo kun stamfita tero, posedis nur sian harplektaĵon neniam ajn tranĉitan.

La 15-an tagon de ŝia restado la Maljunulejo fortranĉis al ŝi ŝian harplektaĵon ŝian langon/lingvon ŝian vivon.

Jen ŝia vivrakonto per virina hararo.



Kanzono-tago kun la Kompanoj en Gray la 11an de aprilo 2015

Surprizis la Kompanojn kaj la organizanton Rolando Cuenot la granda nombro de kantistoj, kiuj partoprenis en tiu unu-taga trejnado. Ni estis ĉirkaŭ tridek, plejparte el Montbéliard kaj Besançon, sed ankaŭ el Belfort, Dijon, du el Vogezoj kaj unu el Svislando, do ĉiuj el orienta Francujo, krom la Kompanoj mem. En la kelo de la kultur-domo ni kantis, akompanataj de kvar talentaj



muzikistoj. Famo kun akordiono perfekte gvidis la grupon kaj per siaj miraklaj oreloj atentis kaj atentigis pri niaj malglataĵoj. En tre bona etoso ni kune kantis 2 horojn matene kaj 3 horojn posttagmeze. La tagmeza paŭzo okazis en la biblioteko de la Esperanto-muzeo. Ĉiuj alportis piknikaĵojn por dividi kun la asembleo kaj vere ni festenis. Kun-premitaj kiel sardeloj en barelo, ĉirkaŭ la grandega tablo, ni sentis nin bele ligita familio. Kelkaj devis eĉ manĝi sur siaj genuoj apud la

granda tablo, sed ĉiuj havis kontentajn mienojn kaj tre ĝuis la ĉeestadon. Laŭ la spertita etoso de tiu tago, certe la reala kantado sur stratoj en Lille anonciĝas tre dinamika kaj brila.

Ginette MARTIN

Ekskurso en besto-ĝardeno.

Sabate la 24-an de aprilo, ni forveturis je la 8a 30 ekde Verduno, por viziti la besto-parkon en Rhodes (Mozelo). Ni estis 8 handikapuloj el Mozo, kun 2 junaj tutorinoj de UDAF el Bar-le-Duc. Ni haltis dum kelka momento en Saint-Mihiel, por trinki varman kafon kaj manĝi krescentojn en kafejo, proksime al la plen-aera bazo de la urbo. Estis impona manifestacio de motorciklistoj koleremaj, kiuj grumblegis kontraŭ la leĝo Macron. Okaze de mia naskiĝdatreveno, Patrick aĉetis de ili belegan ruĝan rozon. Ni alvenis al Rhodes ĝustatempe por la tagmanĝo. Ni tuj manĝis en memserva restoracio viandon "Kasler" (laŭ mozela dialekto), frititajn terpomojn, kaj kukon "Nigra Arbaro". Ni vizitis la grandegan parkon pere de trajneto kaj vidis jenajn sovaĝajn bestojn: lupojn sovaĝajn blankajn, grizajn

kaj nigrajn; ursojn blankajn kaj brunajn; linkojn; "nordajn cervojn"; bizonojn; otusojn diversspecajn; cikoniojn. Estas modo aŭdi la kanton de la lupoj: estas diskoj pri tio, sed, bedaŭrinde, ni ne havas KD-aŭskultilon. Poste, la respondeculinoj de la grupo prezentis al ni belegan ekspozicion pri biodiverseco kaj energioj renovigeblaj. Por la parko, tre gravas la jaro 2015 por tiu speciala misio pri biodiverseco kaj protekto de minacataj specioj, ĉefe rufaj pandoj. Poste, ni spektis agrablan spektaklon pri la bestoj de la arbaro, speciale pri sovaĝaj birdoj, ĉefe la migrado de la cikonioj. Post la spektaklo, ni denove enaŭtomobiliĝis en la veturilon, por trafi denove niajn hejmojn. Ni vidis, tre malproksime, sub-ĉielan koncerton de "municipaj muzikistaroj" En la veturilo, mi strange aŭdis la faman "Ek al la barikadoj" de Jomo kaj folklorajn alzacajn kantojn. Ni revenis je la 19-a horo.

Catherine Roux

2015-julio-06/13 : Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj reciprokaj de scioj, por familioj kun infanoj, spirito RERS kaj SEL, variaj aktivaĵoj kaj Esperanto-kurso. gresillon.org/s1

2015-julio-20/25 : Kasteloj de la Luaro - Turisma semajno - oficiala antaŭkongreso de la 100-a UK en Lillo. gresillon.org/s2

2015-aŭgusto-01/08 : Lingvoj kaj kulturoj de l' mondo - postkongreso de la 100-a UK en Lilo. gresillon.org/s3

2015-aŭgusto-08/16 : Festa Semajno por infanoj kaj familioj - postkongreso de la 44-a IIK ĉe Lilo. gresillon.org/s4

Retadreso: kastelo@gresillon.org Telefono: +33-2.41.89.10.34 (parolu sur respondilon)

Esperanto-Kultur-Domo
Château de Grésillon
St. Martin d'Arcé
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU



'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

En ĉi tiu numero de „NU” ni kore rememoras la homon, kiu grave kontribuis ke nia E-lingva versio de la tre divastiĝinta internacia magazino aperas hodiaŭ same kiel tiuj aliaj en kelkdeko da lingvoj. En ĉijara aprilo p. Korytkowski celebrus sian 70an naskiĝdaton.

Georgo Korytkowski (1945-1998)

Franciskano Georgo (Jerzy) Korytkowski vivis en usona urbo New Brunswick kiam la fondinto de Fokolaro, Chiara Lubich venis oficiale al Novjorko, en majo 1997. Tiam naskiĝis la ideo – demandi ŝin ĉu *Citta Nuova* / (la oficiala revuo de Fokolaro Movado) povas publikiĝi ankaŭ en nia Internacia Lingvo. La programo de tiu mallonga vizito estis ege streĉa: Ch. Lubich estis invitita paroli en la ĉefa UN-oficejo, poste veturis al alia ŝtato ricevi honoran doktorecon, sekve oni planis aliajn renkontiĝojn kiel tiu kun islama komunumo kaj ties gvidantoj. Kiel do ni povus ŝin kontakti kaj informi pri nia E-propono?

Tial ni ekvidis nur unu ŝancon: veturi al *Mariapolis Luminosa* (nordamerika Fokolar-urbeto) kie Ch. Lubich pasigos unu tagon kun usonaj kaj eksterlandaj gastoj. Ni telefonis al p. Georgo kaj proponis ke tiucele ni renkontiĝu eble en Luminosa (li venu el New Jersey kaj ni el Kanado). Li, entuziasma esperantisto, tuj konsentis. J. Korytkowski studis en Romo, tie doktoriĝis pri juro kaj pri internacia komunikado, li parolis flue la italan – do ni pensis ke li estas la plej taŭga persono por prezenti nian iniciaton. Tamen tio ne estis facila, ĉar al Luminosa venis pli ol du mil homoj, ne nur el Usono sed ankaŭ el Kanado, Meksikio, Karaiba Insularo kaj Mezameriko. Baldaŭ post nia alveno al Luminosa, p. Georgo interparolis kun Pasquale Foresi, unu le ĉefaj kunlaborantoj de Ch. Lubich. Poste ni ĝoje ricevis la respondon, ke "Jes, Chiara Lubich aprobis ke ni publikigu *Citta Nuova* / ankaŭ en Esperanto!" Tiun mesaĝon transdonis al mi Andre Weiss, kiu antaŭ jaroj migris el Luksemburgo kaj estis tiam Fokolar-gvidanto por Kanado. Do, nia veturo al Novjorko estis tre sukcesa kaj pro tio p. Georgo meritas nian dankemon.



Jerzy Korytkowski naskiĝis la 19an de aprilo 1945 en vilaĝo Supy, bjalistoka regiono kaj en sia junaĝo lernis en franciskana seminario. Tie oni baldaŭ malkovris lin tre talenta studento, ĉiam preta helpi lernadon al aliaj kolegoj. Pro liaj optimismo kaj sprita humoro, ĉiuj ŝatis Georgon. En majo 1970 Jerzy iĝis sacerdoto kaj post universitataj studoj doktoriĝis pri juro kaj teologio. Poste oni sendis lin al Romo, kie li i instruis en Internacia Kolegio kaj trovis ankaŭ tempon por esperantista agado kaj por partopreno en diversaj E-eventoj. D-ro Korytkowski verkis popular-sciencajn librojn kaj argumentis logike ke Esperanto estas la plej taŭga lingvoponto en la nuntempa kaoso. Tiuj libroj ankoraŭ aĉeteblas tra vaste konataj ret-vendejoj. Ili estis tradukitaj al kelkaj lingvoj. Jen la du titoloj en Esperanto:

1. Ekumenismo kaj internacilingva problemo (eld. en Svislando, 1973)
2. Internacia lingva komunikado en la Eklezio kaj nuntempa mondo (eld. Ritmo en Pollando 1986)

Se ekzistas iu listo de E-poliglotoj, certe tie povus esti ankaŭ lia nomo. P. Georgo flue parolis en pola, angla, esperanto, latina, rusa, hispana lingvoj kaj povis komunikiĝi en la franca, nederlanda kaj germana. En 1984 li estis delegita al usona ŝtato Novjerzejo kie celebradis Meson en tri lingvoj: angla, pola kaj hispana. Tie li laboris kiel juristo kaj ankaŭ deĵoris en hospitaloj. Vojaĝante al Kanado, p. Georgo kelkfoje vizitis nian domon kaj niaj infanoj tre ŝatis lin aŭskulti. Ili tiam frekventis bazlernejon kaj ĝuis lian parolon en kelkaj lingvoj. Pastro Korytkowski rakontis interese pri vojaĝoj, pri diversaj landoj kaj lingvoj kaj kiel bone Esperanto utilas en internaciaj kontaktoj. Lia tipe franciskana simpleco kaj modesto agordis nin ĉiujn amikece kaj tiam Esperanton eĉ mia edzino ŝatis.

Mi ekmiris kiam p. Georgo menciis pri sia plano partopreni Universalan E-kongreson en Aŭstralio. Tre longa distanco de Nordameriko... kaj li eĉ tiel aranĝis la vojaĝon, ke sume li povu ĉirkaŭflugi la terglobon. Mi ne sciis ke ĝi estis lia lasta granda revo, ĉar li estis malsana je ren-kancero kaj mortis sekvajare - la 18an de decembro, nur en sia 53-a vivjaro. Kaj mi bedaŭrinde preterlasis fari fotojn kiam li ĉeestis kun ni kaj ravigis niajn infanojn rakonte pri beleco de la mondo kaj pri valoro de nia Internacia Lingvo. Restis nur memoro pri lia amikeca rideto kaj kortuŝa impreso, kiun al ni postlasis tiu serena franciskana animo. Kaj nun, per ĉi tiu artikoleto, ni povas nur esprimi dankon ke inter tiom da valoraj homoj, kiujn ni povis renkonti per Esperanto, troviĝas ankaŭ Georgo Korytkowski.

"Ni amu homojn antaŭ ol estos jam tro malfrue" – skribis poeto.

Jay Shafer instruis pri dezajno sed por akiri pli da mono, li decidis kromlabori vespere kiel kasisto en vendejgo. “Plimulto de la perlaborita mono sufiĉis nur por lui loĝejon. Tio ne valoris mian tutan penadon” – li ekpensis. Konklude (laŭ praktika devizo: “*Malgranda, sed mia*”) Jay decidis ne plu pagi luadon kaj translokiĝis al ligna dometo.

Kie malpli fariĝas pli

Komence li konstruis dometon 'granda' je 9m² kiun li povis veturigi de unu loko al alia. Por vivi en ĝi, li devis redukti plimulton de siaj posedaĵoj, kiuj (surprize) montriĝis tute senbezonaĵoj. Tion li nur poste malkokvris: “*Vidu, ni ofte fariĝas senvolaj viktimoj de reklamaj kaptiloj. Oni ĉiam provas nin konvinki ke ni ne povas vivi sen aĉetadi pli kaj pli multe da diversaj objektoj.*” Lia mini-domo vekis grandan intereson kaj preterpasantoj demandis Jay kiel eblas vivi en tiel malgranda budo. Post tiaj interparoloj Jay komprenis, ke eble nun aperis surhorizonte precipa “misio” por li: konsciigi homojn ke ni povas vivi pli trankvile sen amasa malŝparado de materialoj. Se ni kontentas vivi pli modere, tiam la vivo montriĝos malpli streĉa kaj pro tio – ankaŭ pli feliĉa. Por antaŭenigi sian ideon, J. Shafer komencis veturadi kun sia dometo kaj ekvidis, ke multaj homoj interesiĝas pri la ebleco vivi kun malmultaj posedaĵoj. “*Vivante en tiel eta domo, vi disponas fakte pri unu ĉambro kiu povas enhavi nur kelkajn bazajn objektojn. Do vi mem devas decidi kio estas vere necesa.*” – li diris.



Tian mini-domon vi povas starigi en ĝardeno, apud familia domo aŭ fiksi sur radoj kaj ĝui liberecon: uzi ĝin kiel moviĝantan loĝejon, per kiu vi povas veturi kaj viziti belajn regionojn. Survoje vi renkontas multajn homojn, inter kiuj troviĝos tiuj interesitaj pri la originala vivstilo (ĵaluzinde "libera kiel birdo" – ili pensus). Kaj tiel la ideo mem disvastiĝas. Dum sia vojaĝado J. Shafer prezentas ekspoziciojn kaj distribuas la instru-materialojn. Kiam pli multe da interesitoj pretis realigi la novan ideon praktike, aperis la ebleco produkti kaj vendi la reklamitajn dometojn. Tiucele Jay fondis kelkpersonan firmaon kaj nomis ĝin *Tumbleweed*. La entrepreno prosperis (nur en kelkaj jaroj ĝi kreskis 7-oble) kaj aliĝis diversaj kunlaborantoj. Por tiuj kapablaj mem konstrui, Jay verkis libron kun diversaj domet-modeloj. Tie troviĝas indikoj kiel tion fari per simplaj materialoj, uzante preskaŭ senkoston ekipaĵon.



Tiel naskiĝis lia sekva entrepreno:

(*4-Luma Firmao de Etaj Domoj*) pere de kiu li realigis jam pli grandan projekton. Ekestis tiel la unua '**Vilaĝo de Etaj Domoj**'. Sekve, la 50-jara Shafer komencis pensi pri alia aventuro. Tiucele li li iniciatis la “Movadon de Etaj Domoj - MdED”

Filozofio de tiu movado signifas vivi simple kaj ĝui liberecon. La bezono akiri pli da tempo - per simpligita vivstilo, sen nervostreĉoj kaj proksime al la naturo - fariĝas la signo de niaj febrecaj tempoj. Rezulte, la ideo pri malgrandaj (aŭ eĉ pri la tre etaj) domoj populariĝas jam en aliaj landoj de Eŭropo kaj en Japanio.

Shafer tiel priskribas la avantaĝon de tiu situacio: „*Fine ni havas tempon por fari tion, kion ni ŝatas. Mi persone povis reveni al tiuj okupoj pri kiuj mi pensis delonge, kiel ekz. ĝui pli longan libertempon, veturojn, ni pli ofte gustumas manĝaĵojn en diversaj restoracioj. Kompreneble nun mi povas pasigi pli da tempo kun mia familio. Kiam ni geedziĝis kaj naskiĝis nia infano, ni vivis en sufiĉe granda domo. Nun, en nia eta domo la filo jam estas 4-jara kaj ni bezonas iom pli da spaco. Do ni ofte ludas ekstere, ĝuante la naturon kaj freŝaeron. Krome, mi kun la edzino reduktas nian superfluaĵajn posedaĵojn kelkfoje dum jaro. En tia medio, ni pasigas kune multe da tempo kaj sentas nin reciproke tre proksimaj*”.



kaj BAVELO
Invitas al

78a regiona staĝo kaj 37-a BAVELO-Seminario 16a - 18a Oktobro 2015 en Pforzheim

En Pforzheim novaĵoj allogas.

Pforzheim – fondita en Romia tempo, grave detruita per bombatakoj dum la Dua Mondmilito, poste rapide kaj per (tro) multege da betono rekonstruita: Pforzheim ne estas konata kiel turisma allogaĵo, sed kiel urbo de la industrio pri oro, juveloj kaj ornamaĵoj.

Per la seminario en Pforzheim BAVELO serĉas novajn vojojn: ni forlasos la bone konatan sistemon de kursoj por komencantoj – progresantoj – parolantoj, anstataŭ tio ni proponas unu metiejon/atelieron por ĉiuj kune, por „lernantoj“ kaj ĉiuj, kiuj kuraĝas ekpaŝi survoje al instruado. Per malgrandaj grupoj, kie la roloj de instruanto kaj lernanto interŝanĝiĝas alterne. **Ekkuraĝu kaj elprovu kun ni tiun ekscitan eksperimenton.**

Pli precize: la sabata antaŭtagmezo enhavos modulojn, kiuj vere estas necesaj kaj gravaj por **ni ĉiuj**, eĉ por tiuj inter ni, kiuj neniel intencas instrui Esperanton: Kiel mi ekkomencas interparoladon pri Esperanto? Kiel mi povas uzi la daŭron de lift-veturado por doni al alia persono imagon pri mia fascino pri Esperanto?

Kiuj estas bone elprovitaj ekzemploj por montri la flekseblon kaj esprimforton de Esperanto?


Tion ĉion ni ne ekscios per aro da sekaj prelegoj, sed kontraŭe ni povas mem elprovi kaj vikle interŝanĝi proprajn spertojn.

La – tradicie „senlabora“ – sabata posttagmezo antaŭvidas la elekton inter pluraj eblecoj: promenado al la tri burgoj – la

elstara bestoparko kun sovaĝaj bestoj el nia regiono (vidu dekstre – junaj idoj de lutro kaj apro) kun belaj promenvojoj – aŭ la esplorado de la ornamaĵa mondo (muzeo pri ornamaĵoj, oro kaj juveloj, „Schmuckwelten“ aŭ la teknika muzeo, kiu prezentas teknikojn de la ornamaĵ-farado).

Je dimanĉa mateno la instruemuloj daŭrigas la laboron en malgrandaj grupoj, dum la aliaj povas partopreni alian ekskurson, ekzemple al „panorametro“ (en la eksgasometro vi spektas 360°-bildon pri la antikva „Romo en la jaro 312“).

Krome atendas vin agrabla kaj interesa vespera programo.



Ludemaj lutroj (supre) kaj junaj aproj en "strio-vesto"



Gasometro: Romo en la jaro 312



Parko apud rivero Enz



vendredo, 16a oktobro

- | | |
|----------------------|---|
| 17:00 - 18:00 | alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj |
| 18:00 - 19:00 | bonvenigo kaj vespermanĝo |
| 19:00 - 20:00 | kurso – parto 1 |
| ekde 20:15 | vespera programo (konatiĝo, filmo) poste knajpo |

sabato, 17a oktobro

- | | |
|----------------------|--------------------------------------|
| 07:30 - 08:30 | matenmanĝo |
| 09:00 - 11:45 | kurso por ĉiuj |
| 12:00 - 13:00 | tagmanĝo |
| 14:00 - 17:00 | ekskursoj por ĉiuj |
| 17:00 - 18:00 | novaj libroj |
| 18:00 - 19:00 | vespermanĝo |
| 19:00 - 20:15 | kurso |
| ekde 20:30 | muzika vespera programo poste knajpo |

dimanĉo, 18a oktobro

- | | |
|----------------------|---------------------------------------|
| 07:30 - 08:30 | matenmanĝo |
| 08:30 - 09:00 | redono de ĉambroj |
| 09:30 - 11:30 | kurso (ateliero, metiejo) aŭ ekskurso |
| 12:00 - 13:30 | tagmanĝo , adiaŭo |

Kostoj

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).
Restado en la junulargastejo, kompleta pensio por 2 tagoj:
 en 4-lita ĉambro 70 €
 en 2-lita ĉambro 90 €

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto aŭ la konto de EFE

**Jugendherberge Burg Rabeneck
 Kräheneckstr. 4**

75180 Pforzheim-Dillweißenstein

Tel: +49 7231 972660,

Fax: +49 7231 972661

info@jugendherberge-pforzheim.de

Alveturo: ... per publikaj transportiloj

Pforzheim estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe-Stuttgart-München. La junulargastejo situas en kvartalo Dillweißenstein en la valo de rivero Nagold.

- De la stacidomo per „Kulturbahn“ (direkte al Horb) ĝis haltejo „Weißenstein“. De tie estas 7-minuta promenjo ĝis la junulargastejo.
- alternative: per buso (linio 3) de la stacidomo ĝis haltejo „Burggartenstraße“ (20-minuta veturado). De tie 5-minuta promenjo al la junulargastejo.

... per aŭto

Pforzheim aŭte atingblas per ekspresvojo A8 (Karlsruhe-Stuttgart).

Venante el okcidento prenu elveturejon **Pforzheim West**, venante el oriento prenu elveturejon **Pforzheim Süd**. Daŭrigu direkte al la urbocentro. Ĉe vojkruciĝo kun strato **B463** sekvu la direkton al **Calw**.

Tio gvidos vin rekte al urboparto **Dillweißenstein**. Ĉe la ponto trans rivero Nagold en Weißenstein veturu dekstren kaj sekvu la pliajn ŝildojn.

Se estas pli facile por vi vidi la hotelindikilojn, tiam sekvu la ŝildojn por restoracio/hotelo Rabeneck.

Ĝi situas tute proksime de la junulargastejo.

Koordinatoj :

latitudo: 48° 52' 8,09"
longitudo: 8° 40' 56,49"

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas. La aliĝo validas post alveno de mono:
 Pagebla per ĝiro al
 CCP Esperanto France-Est
 1997 72 W Nancy
 per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al
 André GROSSMANN
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM
 ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Pforzheim

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	naskiĝjaro	Aliĝilon bonvolu sendi al: S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20 DE-73431AALEN Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge. Simon@esperanto.de
1				
2				
Adreso				Mi partoprenas <input type="checkbox"/> (sabato matene) en la kurso-programo <i>Lerni - Instrui - Ĝui</i> , ĝeneralaj moduloj <input type="checkbox"/> (sabato posttagmeze) en la ĝenerala ekskurso, diversaj proponoj <input type="checkbox"/> alternativo 1 (dimanĉo matene) <i>Lerni - Instrui - Ĝui</i> specialaj moduloj <input type="checkbox"/> alternativo 2 (dimanĉo matene) ekskurso
Telefono:				
Ret-adreso:				
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est				
Tranoktado en la junulargastejo: <input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro <input type="checkbox"/> 4-lita ĉambro <input type="checkbox"/> vendrede/sabate <input type="checkbox"/> sabate/dimanĉe				
Mi serĉas pli komfortan tranoktadon, bonvolu helpi min per rekomendoj				
Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe	
matenmanĝo				
tagmanĝo				
vespermanĝo				
Mi ŝatas manĝi	vegetare	vegane		
Mi havas alergion kontraŭ				Baldaŭ eblos aliĝi elektronike ĉe la retejo http://esperanto-bw.de/seminario-eo

La oka Mezorianta Kunveno en Tunizio en 2015

8-a Mezorianta (kaj Nordafrika) Esperanto-Kunveno - Hammamet - Tunizio

Lokoj kaj datoj: Hammamet, Tunizio, 28-a de Marto 2015 ĝis 31-a de Marto 2015. En la 1-a kaj 2-a de Aprilo estis postkunvenaj ekskursoj.

Mezoriantaj renkontiĝoj

(Raportas Jocelyne Monneret)

Ĉu vi jam aŭdis pri tio???

Krom dum prelego de Renato Corsetti pri Esperanto en arabaj landoj dum UK en Bialistoko, mi nenion sciis pri tiu temo. Februare 2015 mi ricevis de li retmesaĝon pri Esperanto-renkontiĝoj fine de marto en TUNIZIO.

Tial, mi aliĝis perrete, tre facile. Poste la listo diskonigis ĉiujn informojn pri vojaĝo, loĝado ktp. . . Dorota Parzyreck, pola esperantistino, kiu loĝas ekde 26 jaroj en Tunizio, estis la sola organizanto, ĉar malnovaj anoj de la jarlibro neniam respondis al miaj, ŝiaj aŭ alies leteroj!!!

Multe da laboro ŝi faris, por ke la 8-aj mezoriantaj renkontiĝoj estu sukcesaj. Ŝi plenplene sukcesis dank'al siaj gekonatoj en Hamameto.

Sabate, same kiel aliloke en la mondo, Hamameto festis la teron. Vespere ni partoprenis feston apud la maro; podio estis starigita, muziko bruis -mi ne plu estas juna!- kaj de la 20-a 30 ĝis la 21-a 30 la lumo estis malŝaltita. Ni provis lumigi kandletojn ricevitaĵojn kun la aliĝilo, sed ventego forblovis niajn etajn flamojn. Mirinde, neforgeseble, okazis la unua dimanĉo, la 29-a de marto pere de "Asocio por protekto de la malnova urbo Medina".

Laŭ mi, kiu tion jam spertis dum SAT-kongresoj, ege gravas la ideo, renkonti lokajn asociojn.

Post gvidita vizito kun ĉiĉerono loka, nia grupo (proksimume 45 homoj) estis invitita en sidejo de tiu asocio, en malnova maŭzoleo. Nepriskribablaj, allogaj kaj tipaj de la Hamameta regiono estis la pladoj preparitaj de virinoj. Ĉiuj el ili (tre ofte patrinoj de asocioj) klarigis la nomon de la "kuirartaĵoj", kiujn ni poste gustumis. La asocio inkluzivas fotoklubon; belega estis ekspozicio de fotoj faritaj de klubanoj. Ankaŭ videblis prunteprenitaj fotoj nigraj-blankaj fotitaj komence de la 20-a jarcento.



Babilante kun Emir, loka komencanto, mi proponis interŝanĝi dokumentojn pri kreinto de fotografio, kiu naskiĝis en de mi najbara urbo "Ŝalon ĉe Saono", Joseph Nicéphore Niépce.

Dum 3 tagoj kaj duono sinsekvis prelegoj, vizitoj al la Centro Internacia SEBASTIAN, kie plej parte ni loĝis, klarigoj pri agrikulturo (fruktartoj: oranĝoj, citronoj, pampelmusoj, mandarinoj ktp) en tiu bieno de vilao konstruita por Sinjoro Sebastian, vizito al la najbara (ni veturis trajne) Nabeul, gvidita de junuloj esperantiĝintaj antaŭ kaj dum la staĝo.

Bedaŭrinde ni ne povis spekti la filmon "Sinjoro Tadeus": niaj polaj geamikoj estis malhelpitaj ĉeesti de la pola ŝtato, kiu malpermesis ĉiujn flugojn al Tunizio!! Ni la ĉeestantoj, tuj post pafado, kiu okazis en Muzeo Bardo, skribis pri nia solidareco kun la tunizia popolo kaj pri nia ĉeesto, kiu disvolviĝis kiel antaŭvidite. Entute ĉeestis 48 esperantistoj el 13 landoj.

Merkrede, laŭvole kaj pagende, okazis ekskursoj. Unue al TUNISO: muzeo Bardo kaj bazaroj, Carthage, kaj tre bela fama vilaĝo Sidi Bou Said; kompreneble ĉiu vizito daŭris nur 1 horon, sed montris tre bone diversajn facetojn de la tunizia civilizacio. Ĵaŭde ni veturis per buso ĝis KAIROUAN (KERUAN), kie staras la unua moskeo konstruita en Tunizio, kiam la muzulmanoj alvenis post Heĝerio: ŝanĝoj de klimato, de vegetaĵoj senseblaj, kaj (laŭ mi) katastrofo pro polucio pere de plastaĵoj.

Jam la 9-aj renkontiĝoj ricevis du aliĝojn. Ili okazos en TURKIO, marte 2016. <orbipictus@iol.it>



HISPANA KAJ VALENCIA ESPERANTO-KONGRESOJ 1-3ajn DE MAJO 2015

La Hispana kaj Valencia Esperanto-kongresoj okazis ĉi-jare en la bela urbo de Cullera ĉe la mediteranea maro. Al ĝi partoprenis 75 kongresanoj el sep landoj, ĉiuj ĝuis kulturan, turisman, amuzan etoson kaj spertis la senton pligrandigi nian amikecon. Komence de la kongreso okazis interesa enkonduka kurso pri Esperanto gvidata de tre agrabla juna esperantisto.

La kongreso oficiale malfermiĝis pere de Eric Baltasar (Valencio) Toño del barrio (Madrido) kaj reprezentantino de la urbo-domo de Cullera. Ankaŭ la kongresanoj partoprenis salutante je la nomo de sia klubo aŭ individue. Tie okazis donaco de libro al la urba biblioteko.

Jen la prelegoj:

- “Pri temaj retejoj kaj retmerkato en Esperanto”
- “Donkiĥoto kaj Esperanto tria etapo”
- “Taga astronomio” ĉe la kastelo
- “TEJO: kion vi povas fari por la movado”
- “Ateliero pri kreado de kanto”
- “Alia Vietnamio” kaj “Koreio”
- “E-instruado: agnosko de diplomoj, kiel bone instrui kaj Ligo de Instruistoj”
- “Nova monda kulturo kaj Esperanto”
- “La ret-katalogoj de Biblioteko Juan Régulo: ontaj perspektivoj”



Dum la kongreso estis disponebla libro-servo kaj ekspozicio de malkovritaj malnovaj poŝt-kartoj.

La kongresanoj ankaŭ povis vidi subtitolitajn mallongajn filmojn kaj ĝui ludojn ankaŭ diskutetojn pri ĉio.

Agrabla interkona vespero, kie ni prezentis kaj gustumis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el diversaj regionoj alportitaj de ĉeestantoj.

Sabate ni vespermanĝis kune en la bankedo, kie ni gustimis valencian paeljon, ankaŭ por vegetaranoj, poste la koncerto de Jonny M estis tre sukcesa kaj la homoj ĝoje dancis, kantis, kaj aŭskultis lian mirindan regean muzikon.

La asambleo de la Hispana Junularo HEJS okazis sabate, tamen la asambleo de HEF kiel kutime okazis dimanĉe matene.

Ni frate adiaŭis ĝis la venonta renkontiĝo en esperantujo, kelkaj homoj ekskursis post la kongreso tra Valencio.

Rosa López



Humura paĝo



KIU ESTAS LA IDIOTO?

Matene la pastro malfermadis leterojn senditajn de fideluloj. Eltirante el kovrilo folion li legis ununuran skribitan vorton: "IDIOTO"

Prelegante sekvintan dimanĉon la pastro menciis la fakton al sia aŭdantaro:

- Kelkfoje mi ricevis leterojn el homoj, kiuj skribis siajn leterojn kaj forgesis subskribi ilin. Tamen, ĉi-semajne mi ricevis leteron el iu, kiu subskribis sed forgesis skribi la letertekston.

KUVEGA TESTADO

Dume sia vizito al psikiatra hospitalo iu vizitanto demandas al ties direktoro:

-- Kian saĝecon vi uzas por decidi, kiu necesas esti enhospitaligata? La direktoro respondis:
 -- Ni plenumas je akvo unu kuvegon kaj ofertas al malsanulo unu kuletron, unu glason kaj unu sitelon kaj petas lin malplenigi la kuvegon.
 -- Mi ja komprenis - diris la vizitanto ĉiu normala homo utiligus la sitelon, kiu ja estas pli granda ol la kulero kaj la glaso.
 -- Ne - respondis la direktoro
 -- iu normala homo malŝtopus la kuvegon.
 -- Do, kion vi preferas: privatan ĉambron aŭ komunan ĉambron?

La Blondulino

Blondulino eniras en apotekon tenante bebon kaj demandas al apotekisto ĉu ŝi povus uzi porbeban pesilon.

- "Mi bedaŭras sinjorino" diris la apotekisto "riparota estas nia porbeba pesilo. Sed oni povas kalkuli la beban pezon se oni pesos la patrinon kune kun la bebo sur porplenkreskula pesilo. Sekve, oni pesos la patrinon aparte kaj dekalkulos la duan rezulton el la unua".

"Ha! Tio ne ĝustas" diris la blondulino.

- "Kial ne?" Demandis la apotekisto.

- "Ĉar mi ne estas la patrino, mi estas la onklino"

Malatenta viro

Iu malatenta viro ekstaris el sia busa sid-loko erare kunportante ombrelon de apuda virino. Ŝi ekkriis, do li, tre kortuŝe pardonpetis kaj redonis la ombrelon al ŝi.

Vespere de la sama tago, profitante magazenan rabat-kampanjon, li aĉetis du ombrelojn por donaci al siaj edzino kaj filino. Surstrate li renkontis tiun virinon de la buso, kiu malice diris al li:

Mi rimarkas, ke vi havis profitan tagon, ĉu?

EŬTANAZIO

Hieraŭ mia edzino kaj mi sedis en televida ĉambro kaj parolis pri kelkaj aferoj de la vivo. Ni paroladis pri vivi kaj morti. Do mi diris:

- Neniam lasu min vivi je vegetiva stato, dependanta de iu maŝino aŭ iaj likvaĵoj. Se vi vidos min en tiu stato, malŝatu ĉion, kio subtenas min viva. Ĉu bone?

Imagu, ŝi tuj ekstaris, malŝatis la televidon kaj forĵetis mian bieron.

SUR ŜOSEO

Iu ulo hejmen-veturas stirante aŭtomobilon pli rapide ol la permesita rapideco.

Rigardante en la retrospegulo li vidis polican aŭtomobilon kun policano, kiu insiste gestis kaj hupis, por ke li haltu.

Li pensas: "mi estas pli rapida ol li" kaj piedpremas la akcelilon ĝis-

funde. La aŭto tre rapidas kaj la policano sekvas lin je senbremsa rapideco: 100, 120, 140, 160 km/h.

Kiam la rapidometro atingas 180 km/h la policano daŭrigas malantaŭe, do la ulo rezignas kaj haltigas la aŭtomobilon.

La policano venas ĝis la fenestro kaj diras al tiu ŝoforo:

- Atentu bone, hodiaŭ mi havas la cegan labortagon kaj mi volas nur reveni hejmen. Donu al mi bonan klarigon, tiel mi lasos vin foriri.

La ulo ekpensis momente kaj respondas:

- Tri semajnoj antaŭe mia edzino fuĝis kun policano. Kiam mi vidis pere de mia retrovidilo la polican aŭton, mi pensis, ke estas vi kiu volus redoni ŝin al mi.

ĈE PUBLIKA NECESEJO

Revenante hejmen iu civitano sentis grandan ventran doloron, tial li haltis ĉe superbazaro por eniri necesejon. Ĉar la unua fekejo estis okupita, li uzis la apudan. Sidante, li aŭdas iun en apuda ĉambreto demandi:

- Saluton! Ĉio bone?
- Malgraŭ, ke li ne kutimas paroli kun nekonatoj en publika necesejo, li respondis:
- Bone ... Mi daŭrigas navigante sur la maro de la vivo!
- Denove la najbaro demandis:
- Do, kion vi nuntempe faras?
- Malgraŭ tio ke li ektaksis strange la paroladon, li respondis:
- Bone. Nun mi estas ĉi tie en fekejo. Poste mi iros hejmen...
- Do li aŭdis la najbaron diri je enua tono:
- Senkulpigu min, denove mi telefonos al vi poste. Ĉi tie apude estas fekanta fuŝulo, kiu respondas al mi, ĉiufoje kiam mi demandas ion al vi.




Problemo pro la sen-arbarigo



Prefere pisu pli trafe ol elekti la mezan vojon

Ni lernu per distraĵoj



JG

1. Antikva regno en Me-zopotamio.
2. Respondo. Voĉkategorio'.
3. Metalaj ĉarpentaĵoj en petrolo industrio.
4. Kutim'. Komercia korporacio.
5. Aktivec'.
6. Interplektaĵ'. Kapo de statuo.
7. Elektonika tub' en televida kamerao.
8. Sen, sen koro. Minaĵo.
9. Mezurunuo de longo.

VERTIKALE

1. Prahinda religi'.
2. Vento. Kolora likvo (*inverse*).
3. Urbo proksime de la loko de tiu, kiu estas nomita en la unua horizontala linio.
4. Efiki (*inverse*). Negi.
5. Plilongigit' (*adjektivo*).
6. Supernatura estulo (*inverse*). Komenco de sceno.
7. Pinta metala bastonet'. Norda brit'.
8. Aparat'. Preciza tempo.
9. Fluo (*inverse*). Sovaĝa besto.

Konsiloj

Kara Roberto,
Mi uzis aŭtomobilon por iri al laborejo kaj lasis edzon hejme spektanta televidon, kiel kutime. Mi stiris dum iom pli ol unu kilometro, kiam la motoro paneis kaj la aŭto subite haltis.
Revenante hejmen por peti helpon de la edzo, mi eniris kaj ne povis kredi. Li estis en dormĉambro kun la filino de la najbarino!
Mi estas 32-jaraĝa, mia edzo 34 kaj la knabino 22. Ni estas geedziĝintaj jam 10 jarojn. Mia edzo konfesis, ke jam de ses monatoj li kaj la knabino amoras.
Mi tro amas lin tial mi estas ege afliktita.
Ĉu vi povas helpi min?
Antaŭdanke
Daniela

RESPONDO

Kara Daniela
Kiam aŭtomobilo haltas post veturado de mallonga distanco, multaj faktoroj kaŭzi tion.
Unue certigu ĉu estas benzino en la benzinujo. Sekve, konfirmu ĉu la benzina filtro estas ŝtopita aŭ ne. Kontrolu ankaŭ ĉu ekzistas problemo pri elektronika injekto. Se ĉiuj kontrolitaj aferoj ne solvis la malbonaĵon, eble la bezinsuĉilo mem paneis ne faciligante sufiĉan preman kvanton al injektiloj.
Atendante helpi vin,
Roberto

En magazeno de ludiloj, oni vendas Barbie-pupinoj je diversaj prezoj :
"Barbie skias" kostas 30 eŭrojn
"Barbie motorciklas" kostas 50 eŭrojn

kaj "Barbie divorcita" kostas 240 eŭrojn.
Patro demandas al la vendisto :
- Kial "Barbie divorcita" estas tiom kosta?
- Ĉar ŝi estas liverata kun la domo de Ken, la veturilo de Ken, la mebloj de Ken, la motorciklo de Ken,...

- Kiel fari por edziĝi kun virino bela, riĉa, obeema kaj inteligenta?
- Edziĝi kvarfoje !

Du amikoj renkontiĝas sur strato :
- Venu viziti min ĉi-vespere, mi organizas komunan amorad-tempon.
- Bona ideo, kiom da ni estos?
- Ni estos tri, se vi venos kun via edzino!

Turisto vizitas la regionon Loch Ness, haltas en trinkejo kaj demandas:
- Kelnero, ĉu vi povas diri al mi, en kiu horo aperas la monstro?
- Ho, neniam antaŭ 5 ĝis 6 viskioj!



SOLVOJ Krucvorttenigmo de la numero 169

Horizontale: 1.ABREVIACO 2. LEOPARD 3.PALISAR 4.AT. KANAĴL 5.RULU. AV 6.OL. RENODI 7.LIM 8.ANAS. PLOR 9. DERMATORO

Vertkale: 1.ALPAROLAD 2. BEATUL. NE 3.ROL. LAR 4. EPIKURISM 5.VASA. EM 6. IRANAN 7.ADRA. ORLO 8.JAD. OZ 9.OKULVITRO

La 67-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 16-23 majo 2015

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis samtempe kun la 11-a ĉina E-kongreso, kiu daŭris nur tri tagojn. Ĝi okazis en la urbo Kunming nomata la urbo de eterna printempo. La temperaturo superis 30°C dum nia kongresa semajno. Kunming situas en bela parto de la provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio. Ni restadis rande de la urbo en agrabla hotel- kaj kultur-komplekso Fubao, kie okazis ambaŭ kongresoj. Krom multaj ĉinaj partoprenantoj al la evento aliĝis 42 geesperantistoj el Eŭropo. Jam en la flughaveno bonvenigis nin "freŝbakitaj esperantistoj". Ili estis volontuloj el studentoj de la Profesia Artkolegio de Kunming. En ĉiuj okazaĵoj ili estis pretaj saluti nin denove. Dum la interkona vespero ĉinaj esperantistoj preparis muzikan programon.

La dimanĉa inaŭguro estis impona. Ĉe la enirejo de la salono ambaŭflanke vice staris belaj junulinoj vestitaj en buntaj kaj elegantaj etnaj kostumoj. Sur la podio sidis ĉinaj reprezentantoj kaj gravuloj de la E-movado. Inter ili la prezidantino de IFEF Rodica Todor, la sekretario Vito Tornillo kaj la honora prezidanto Romano Bolognesi, la du lastaj el Italio. Post la festparoladoj oni realigis komunan fotadon antaŭ la akceptejo. Agrabla estis muzika prezento kun tradiciaj ĉinaj instrumentoj. Post tio, sekvis salutado de reprezentantoj de diversaj landaj sekcioj de IFEF kaj aliaj asocioj. Ĉe la fino, post la malfermo de la kongreso, gestudentoj de la Profesia Artkolegio bravvoĉe kantis la E-himnon "La Espero". Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo. Ĉinoj prezentis surekrane retpaĝojn de "El Popola Ĉinio" kaj de la Ĉina Radio Internacia (ĈRI) ni povis aŭskulti partojn de la programo kaj spekti kelkajn filmetojn, kiuj gajnis la konkurson de la filmfestivalo "Teo kaj Amo". Posttagmeze okazis E-kurso gvidata de s-ino Luigia Oberrauch Madella el Italio.

La temo de la fervojista kongreso estis: "Esperanto kunligu la landojn laŭ la nova Silka Vojo". Oni menciis la fakton, ke la unua internacia fervojlinio de Ĉinio ekiris de Kunming ĝis Vjetnamio en la jaro 1910. Okazis kelkaj fakprelegoj, gazetara konferenco, oni parolis pri movadaj aferoj kaj fervojaj novaĵoj. Bruno Henry parolis pri sia vojaĝado en Irano, Liu Jun prelegis pri la svisa fervojo, Ladislav Haki pri la vartrafiko en Eŭropo kaj Azio. Gastoj el Bulgario prezentis la venontan IFEF-kongreson okazontan apud la urbo Varna ĉe la Nigra maro. Ĉe la fino de la kongreso oni transdonis al ili Esperanto-flagon.

Ege interesaj kaj emociplenaj estis ĉiuvesperaj kulturaj programeroj kaj altnivelaj artaj spektakloj fare de junaj gestudentoj kaj profesoroj de la Profesia Artkolegio, kies direktoro s-ro Duan Yongxing estas esperantisto kaj samtempe la prezidanto de la LKK. Ni spektis diversajn dancojn, kantojn kaj ĥorkantadon, muzikaĵojn kaj akrobataĵojn. En tiuj spektakloj oni nur malfacile povas superi la ĉinan talenton. Ĉio estis vere altkvalite prezentita kaj la kanto-tekstojn tradukitajn al Esperanto ni povis legi surekrane. Ni estis raptitaj pri ĉiuj riĉaj programeroj. Ili restos longtempe en memoro de ĉiuj partoprenantoj.

Alia rimarkinda afero estis la manĝo. Rondaj tabloj pleniĝis per specialaj ĉinaj pladoj, parte tre spicitaj. En la memserva manĝejo estis elekto el pli ol kvindek pladoj. Abundo da ĉiuspecaj legomoj, viandaĵoj, ovaĵoj, fiŝaĵoj, vaporumitaj farĉitaj farunbuloj, diversaj saŭcoj, supoj, kuketoj, akvomelono kaj kompreneble ne mankis rizo trifoje tage. Ĉiutage ni povis gustumi ion novan. La manĝoj ofte estis tro spicitaj, tro pikaj. Tamen ĉio estis tre bongusta. Ĉinoj kutime trinkas akvon, teon aŭ rizakvon. Dum la bankedo ni gustumis fortan brandon. Se oni deziris trinki kafon oni devis ĝin aĉeti en vendejo kaj mem pretigi.

Dum la IFEF-semajno ni ekskursis al Xishan monto (Okcidenta monto). Per telfero ni supreniris ĝin kaj de tie ni piede malsupreniris admirante belajn pejzaĝojn, diversajn pavilonojn, ornamitajn ŝtuparojn, religiajn altarojn, kavojn, rokarojn kaj la lagon Dianchi. Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis fervojmuzeon de Yunnan. Ĝi estis konstruita en la jaro 1990 ĉe la norda fervojstacio. Ni vidis multajn eksponaĵojn bezonatajn ĉe la fervojo kaj historiajn fotojn, dokumentojn pri konstru-fazoj de la fervojo, mapojn, uniformojn, trajnmodelojn ktp. En la lokomotiva halo nin impresis diversaj lokomotivoj, ĉe kiuj ni grupe fotiĝis. La muzeo donas superrigardon pri la disvolviĝo de fervojo en la provinco Yunnan.

Poste ni ĝuis promenon en la parko de Cuihu lago (Verda lago). Ĝi estas tre animita. Kelkaj personoj ekzercas dancadon kaj aliaj spontanee kantadon. Luj ripozas ĉe lotusplena lageto, aŭ ludas ĉinan tabloludon, aliaj aĉetumas aŭ rigardas budojn plenajn je memoraĵoj, vestaĵoj, manĝaĵoj. Admirindaj estas diversaj pavilonoj, pontetoj, insuletoj kaj bambuaro. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da tempo por trairi kaj malkovri la tutan 24-hektaran parkon.

La tutaga ekskurso gvidis nin al la Ŝtona arbaro. Ĝi situas je 85 km for de la urbo Kunming. Survojaj laboroj malrapidigis nian busvojaĝon. Dume ni povis admiri variajn pejzaĝojn, malgrandajn vilaĝetojn, konstantan domkonstruadon kaj vastajn rizkampojn prilaboratajn de kamparanoj kun tipaj konusaj ĉapeloj.

La Ŝtonarbaro vere impresis. Ni promenis inter rokaroj, ĉirkaŭ lagetoj kaj diversformaj kaj koloraj ŝtonegoj. Laŭ fantazio oni povas en ili imagi diversajn figurojn kaj estaĵojn. Florantaj kampoj, ŝvebantaj papilioj, plurkoloraj arbustoj kaj tropikaj floroj alvokas fortan impreson kaj belecon de tiu paradiza loko.

Interesa estis ankaŭ la loka bazaro, kie oni vendis ion ajn, bezonatan kaj ne bezonatan. Allogaj estis tropikaj legomoj kaj fruktoj. Malpli allogis kokin- kaj porkpiedo, pork-oreloj kaj muzeloj, vivaj bufoj kaj serpentoj atendantaj aĉetontojn por la konsumado. Ne mankis ŝamanaj medicinaĵoj.

La lasta vespermanĝo estis pli festa kaj la adiaŭa programo okazis denove en la halo de la Profesia Artkolegio kun bunta programo. Kelkaj elstaraj personoj ĉiam post la prezentitaj spektakloj persone dankis kaj manpremis la aktorojn.

Dum la tuta semajno ni ĝuegis riĉan kulturan programon kaj ĉinan afablecon. Koran dankon al la organizantoj pro la etosoplana kongreso!

Liba Gabalda

Mirinda vojaĝo tra Rumanio de Karpatoj ĝis la delto de Danubo



Jam de kelkaj jaroj Rodica Todor orgazinas turismajn vojaĝojn tra Rumanio. Ankaŭ ĉi-jare ŝi invitis samideanojn aliĝi al ŝiaj vojaĝoj. En Verdun, okaze de nia regiona staĝo, ŝi ne nur prelegis pri Rumanio sed ankaŭ disdonis invitilon kaj programon pri la ĉi-jaraj ekskursoj. La kulmino estis la vizito al la delto de Danubo kun loĝado sur hotelo-ŝipo. La multaj brakoj, kanaloj, lagoj, marĉoj de tiu delto estas natura rezervejo por multaj birdoj, kiuj tie abundas.

La duan de junio 2015 alvenis preskaŭ ĉiuj partoprenantoj al la flughaveno de Bukareŝto. Per urba aŭtobuso ni atingis la nordan stacidomon, proksime de kie troviĝis nia hotelo Hello. Tiel ekestis grupo de 17 personoj, plej multaj el Francio, (tial necesis iom bremsi la krokodiladon), sed ankaŭ el Belgio, Japanio kaj Italio. Rodica Todor estis nia lerta gvidantino kaj bone zorgis pri multaj detaloj.

La turismado komenciĝis la 3an de junio per vizito al la malnova centro de la ĉefurbo Bukareŝto kaj al la Reĝa Palaco Kotroĉeni.

Tie ni eksciis pri la historiaj eventoj en Rumanio, pri la 4 reĝoj, kiuj regis en la lando kaj ni povis admiri la diversajn salonojn de la reĝoj kaj reĝinoj, kiuj multe influis la vivon en la lando.



Folkloraj dancoj en la subĉiela nacia muzeo de la vilaĝo "Dimitrie Gusti"

La reĝoj kaj reĝinoj de Rumanio:
 1866 - 1914 Karolo la unua
 Elizabeta
 1914 - 1927 Ferdinando la unua
 Maria
 1927 - 1930 Mikaelo la unua
 Anna de Parmo
 1930 - 1940 Karolo la dua
 1940 - 1947 refoje Mikaelo la unua
 Anna de Parmo



Kun scivolemo, ĉiuj deziris vidi la palacon de la Parlamento, kiun la diktatoro Ceausescu konstruigis por la tiama komunista partio. Pro prepar-laboroj, ĝi bedaŭrinde ne estis vizitebla la unuan tagon kaj la vizito estis prokrastita je la fino de la ekskurso. Komencita en 1983 la konstruaĵo kovras loĝeblan areon de 330 000 kvadrataj metroj. La pinto de la palaco atingas 86 m ekde la ter-etaĝo kaj la profundeco 92 m. (12 niveloj surteraj kaj 8 niveloj subteraj)



La tuta vojaĝo konsistis el 3 etapoj:

La unua etapo: **Bukareŝto, ĉef-urbo de Rumanio.**

La 4an de junio komenciĝis la dua etapo: **Transilvanio.** Ni forveturis de Bukareŝto direkte al Braŝovo ĉe la Karpatoj, tra la valo de Prahova. Survoje ni vizitis la Monaĥejon Sinaia kaj ties muzeon.



Sinaia, nomata **La perlo de Karpatoj**, troviĝas ĉe la malsupro de la montoj Buĉeĝi kaj Baju.



George Enescu estas la plej fama rumana komponisto. (1881-1955) Ni povis viziti lian vilaon.



La kastelo Peleș estas unu el la plej interesaj kaj vizitataj rumanaj muzeoj. Ĝi estis la reĝa somera rezidejo de la reĝo Karlo la unua kaj Elizabeta.




Survoje vizito al fortikigita preĝejo Prejmer. Vespere ni atingis Braŝovon kaj tranoktis en la hotelo Coroana. (Iama Kronstadt). La postan tagon ni vizitis la urbo-fortikaĵon ĉe la piedoj de la monto



Tâmpa. Interne de la fortikaĵoj troviĝas la iama germana urbo kun ties stilaj domoj. Ekster la fortikaĵoj ĝis diversaj valoj troviĝas domoj kun rumana stilo.

En la postaj tagoj, ekde Braŝovo ni vizitis diversajn lokojn, la kastelon Bran (Drakula), al la Monaĥejon Sambata de Sus. (Brankoveanu).



En Sibiu, ni povis ĝui la historian urbo-centron kaj la mezepokan fortikaĵon, kiu restis nedetruiita en la du mondmilitoj. En 2007 ĝi estis elektita "kultura ĉefurbo de Eŭropo".

En tiu sabato okazis kelkaj geedziĝoj, en preĝejo kaj surstrate eblis admiri la ege belajn kostumojn. Promenante tra la strato, ni trovis la iaman domon de Andreo Cseh.





La 8an de junio komenciĝis la tria etapo de nia vojaĝo **La delto de Danubo**.

Per buso kaj 6 horoj da veturado trans la Karpatoj ni atingis la urbon Tulcea. Tie sur kanalo troviĝis hotel-ŝipo por la tuta grupo. La ŝipo ne havis motoron, tial ĝi estis tirata per alia ŝipo.

Tuj post la alveno kaj instaliĝo ni povis tag-vesper-manĝi. Kaj jen la ŝipo tute trankvile moviĝis laŭ la larĝaj kanaloj por atingi lokon ĉe la bordo dum la nokto. Malsupre troviĝis la 2- aŭ 3-litaj ĉambroj, mez-nivele la manĝo-salono kaj sur la supra teraso eblis ripozi sub vasta sun-ombrello.

En la postaj tagoj per alia boato ni ŝip-promenis laŭ pli mallarĝaj kanaloj kaj en iuj lokoj tute malrapide veturis aŭ eĉ haltis por admiri la diversajn birdojn, kiuj tie ege abundis. Krome necesis

eviti timigi la birdojn per la bruo de la motoro. Dum 3 tagoj ni ĝuis tiun trankvilan etoson en la naturo, for de urbaj bruoj kaj ret-konekto.



Fotoj kaj raporto de **Andreo**



La 11an de junio nia hotel-ŝipo denove moviĝis direkte al Tulcea, kie nia aŭtobus-ŝoforo atendis por veturigi nin al Bukareŝto. Survoje ni iom vizitis la marbordon de la nigra maro ĉe Konstanca.

Tiel finiĝis tiu mirinda turismado dank'al la kompetenta organizado fare de Rodica Todor.

Multajn dankojn al nia afabla gvidantino, kiu planas ĉiu-jare organizi tian turismadon tra Rumanio. Eble venontjare vi ĝuos similan aventuron.

Mia vojaĝoj tra Irano Raportas Bruno Henry (sekvo de antaŭa numero)



Giti gvidis min dum tri tagoj por viziti Teheranon. Ni vojaĝis per metroo kaj busoj. Kelkaj metrovagonoj estas rezervitaj por virinoj. Tamen virinoj povas akompani edzon aŭ konatulon en aliaj metro-vagonoj. En la urba buso la antaŭa parto estas por viroj kaj la malantaŭa parto estas por virinoj. Kelkaj viroj en metroo rimarkis, ke mi estas eksterlandano kaj faris demandojn al Giti, kiu mi estas. Ŝi diris, ke mi estas franco kaj ke ni interparolas en Esperanto. Ŝi klarigis al ili, kio estas Esperanto. Ni vizitis la reĝan palacon Golestan de eksa Ŝao Sha Reza PAHLAVI. Li estis la eksa irana reĝo kaj en 1979, revolucio forpuŝis lin. Tiu palaco estas ornamita lukse kaj riĉege. Ankaŭ en Teherano estas granda bazar, kiel en Istanbul, kie mi vidis en butikoj grandajn persajn belajn tapisojn!

Mi vespermanĝis post la noktiĝo kun familianoj de Giti. Tiam dum preskaŭ mia tuta restado okazis ramadano. Do, ĉiuj trinkis kaj manĝis post noktiĝo. La restauracioj ne funkciis la tutan tagon. Ni manĝis sidante sur la suroj kaj sur tapiŝoj. Muziko estis aŭdebla. Ni manĝis rizon kun safrano, kokidaĵojn, salatojn kaj diversajn bongustajn dolĉaĵojn. Filo de Giti kun edzino kaj la bogepatroj de la filo estas tre afablaj kaj simpatiaj. Ili faris demandojn pri nia vivo en Francio kaj demandis al mi, kion opinias francoj pri Irano. Viro dancis kun giganta kapo de kuiristo surŝultre laŭ bela irana muziko. Oni diris al mi, ke en Irano oni ne rajtas danci! Tre bedaŭrinde!

Tiam mi pasigis tri tagojn ĉe Surush kaj Zore. Ni iris aŭte al infanĝardeno, kie Zore estas direktorino. Zore montris al mi la ĉambrojn, kie lernas aŭ ludas la infanoj. Tie Zore instruas la anglan al kvin-jaraĝaj geknaboj. “Ĉiuj gepatroj volas, ke iliaj gefiloj lernu la anglan” diris al mi Zore. Verŝajne tio multe amuzas ilin. Mi estis kuriozaĵo ĉi-tie! Oficisto de la urbodomo venis tien kaj invitis min viziti sian oficejon.

Ni vizitis Nasrin la fratino de Zore. Nasrin kaj Zore estas fratinoj kurddevenaj. Ni tagmanĝis kaj vespermanĝis post la noktiĝo sub laŭbo en nova granda parko. Temperaturo estas pli freŝa ol en la domo. Mi ludis per domenoj, kun Seper dek-jara filo de Zore kaj Surush kaj poste kun Aida dek-ok-jara filino de Nasrin kaj

Scharam, mi ludis per ludiloj de la parko.

Fine de mia restado en Teherano Hamzeeh kaj lia edzino kaj du filinetoj gastigis min tri tagojn. Hamzeeh gvidis min por viziti la turon Azadi. Ĝi estas 48 metrojn alta betona konstruaĵo kun enormaj piedoj kiel la Ejfel-turo en Parizo. Ŝao Reza PAHLAVI konstruigis ĝin antaŭ 40 jaroj. Ene estas mirinda muzeo pri belaj diverskoloraj ŝtonetoj. . . ankaŭ roboto ludas pianon!

Kun Hamzeeh, lia edzino kaj la filinetoj ni forveturis aŭte norden de Teherano al la parko Jamchidihyeh, je unu horo da veturado. La parko etendiĝas ĉe la altaĵoj de la montaro. Verdiĝanta arbaro, rokoj kaj panoramo super la ĉefurbo donas bonajn kialojn por veni tien. Ni trovis ĉi-tie malvarmeton sub la arboj kaj ankaŭ dank'al akvo, kiu rapide malsuprenfluas de la montaro tra kanaletoj laŭlonge de la vojoj. Tio bonefikis, ĉar en la urbo regis varmego. Hamzeeh kaj mi decidis grimpi sur la ŝtuparo, kiu kondukas al rigardejo, ĉe la supro de la montaro. De la supro ni admiris la panoramon de la giganta Teherano, kiu etendiĝas laŭ 100 kilometroj, ĉirkaŭita de montaro. Vento ne multe blovis sur tiu urbejo. Pro tio, vualo, formita pro poluado, stagnas super Teherano blokita inter montaro. Malpli densis la vualo pro la ripoztago. Ni malsupreniris kaj nombris la ŝtupojn. Estis 550 ŝtupoj entute!



Isfahano Irano

Post nokta busveturado de Teherano mi alvenis matene kun Giti je la kvina en urbeton antaŭ Isfahano. Giti petis de la bus-ŝoforo halti ĉe la rando de la aŭtovojo sub ponto. La edzo de Farshide venis kun sia aŭto por ŝofori nin al sia domo. Pro ni, tiuj homoj ne dormis la tutan nokton por akcepti nin. Ili varme akceptis nin kun sia juna filino por du tagoj.

Ni vizitis la ĉefan palacon, kie staras du belaj moskeoj kovritaj per blua ceramikaĵo. Tutcerte estas unu el la plej belaj en la mondo. Ni ankaŭ vizitis la palacon de la ŝaho. Isfahano estis ĉefurbo de la persa imperio kun granda civilizacio. En la bazar estas multe da metiistoj, veraj artistoj, kiuj prilaboras el kupro kaj stano (metalo griza kaj facile fandebla) telerojn, kruĉojn, kulerojn, soldatojn, ankaŭ latunaĵojn, (flava alojo el kupro kaj zinko), ledaĵojn (felo preparita por industriaj uzoj:

ŝuoj, rimenoj kaj aliaj), kaj kaligrafiaĵojn. Ili laboradis antaŭ ni.

Yadz Irano

De Isfahano ĝis Yadz ni busveturis posttagmeze. Yadz estas fama urbo en Irano pro siaj tre bongustaj kukulaĵoj kaj sukeraĵoj. Mi frandis ilin!

Sabate ni vizitis la malnovan urbon kun ĝiaj domoj konstruitaj per argilmasonaĵo. Mi vidis ĉe la supro de domoj inĝeniajn ventokaptilojn, iam nomatajn “ventoturoj” “badgir”. Temis pri vertikala strukturo apud domoj (privataj aŭ publikaj) por enirigi venton en la internon de la konstruaĵoj por malvarmigi per akvo la venton kaj sekigi la enajn spacojn. Ventokaptilo aspektas kiel tureto kovrita ĉe la supro, kaj ĉe la vandoj estas vertikalaj fendetoj, por ke eniru la aero.

Tie, ni estis ĉe la rando de la dezerto: 35 gradojn kaj pli varmis ol en Teherano kaj Isfahano.

Elirante de la prizono de Aleksandro, francoj alvokis min. Estis Olivier kaj lia filino Laura, kiujn mi renkontis unu semajnon antaŭe en la trajno ĉe la landlimo inter Turkio kaj Irano. Ni interŝanĝis pri niaj vojaĝoj kaj tagmanĝis kune en restoracio.

Ŝirazo Irano

De Yadz al Ŝirazo ni busveturis en la posttagmezo. Ŝirazo estas 850 kilometrojn for de Teherano. Ekde Nilvange (apud Thionville), mia urbeto, mi veturis ĉir-

kaŭ 7000 kilometrojn ne veturante aviadile! Tiamaniere mi scias, kiom longa estas la distanco kaj kiaj estas la pejzaĝoj vojaĝante kun popoloj.

Kiam mi rigardis la mapon mi surprize konstatis, ke mi estis ĉe la plej fora punkto de mia vojaĝo. Ŝirazo estas pli fora ol Bagdado kaj Kuvajto!

Ŝirazo estis ĉefurbo de Persio. Ĝi enhavas 1,5 milionon da loĝantoj kaj estas grava urbo ĉe la vojo al la Persa Golfo. Vespere akceptis nin Mohammad, kun edzino kaj filino Fatima.

Dum du tagoj ni vizitis diversajn vizitindajn lokojn de Ŝirazo: moskeojn, belegajn ĝardenojn, fortreson flankitan de oblikva turokvazaŭ la turo de Pizo-kaj maŭzoleon de irana, famkonata, ŝatata poeto Saadi, kiu vivis en la mezepoko.



Mi admiris la Maŭzoleon Shah Cheragh. Ĝia kupolo estas turkisa kaj ĝia fasado estas el blua faienco. Ene la grandaj ĉambroj estas kovritaj kaj ornamitaj per miloj da speguloj kun alveol-forma kupolo.

Persepoliso Irano

Ni forveturis per taksio al Persepoliso, 65 kilometrojn norde de Ŝirazo. Persepolis konstruigis Dariuso la unua reĝo de Persio en 518 antaŭ Kristo, cele al prestiĝa ĉefurbo de la persa imperio.

Tiu mirinda palaco impresis min. Altaj kolonoj staras de longaj jaroj. Iuj estas kovritaj per ĉapelo en formo de virbovo kaj leonoj.

De Ŝirazo ĝis Isfahano ni busveturis posttagmeze. Poste ni pasigis la tutan nokton en kuŝvagono kun simpattia irana familio, kun infano, ĝis Teherano, kie Hamzeeh akceptis nin.



Rascht Kaspia Maro Irano

De Teherano ĝis Rascht la distanco estas 300 km en 5 horoj per buso. Rascht situas norde de Irano, ĉirkaŭ 30 kilometrojn for de la Kaspia Maro. Ĉi-tie oni parolas alian lingvon ol la persan, la Gilakan.

La kreskaĵoj pli kaj pli densiĝas kun arboj, kampoj kaj herbejoj. La kontrasto estas okulfrapa, ĉar aliloke, unu triono de Irano estas seka duondezerto kaj tre varma. La temperaturo estas malpli alta ol en Nilvange, ĉirkaŭ 35 gradoj. Sed la atmosfero estas tre peza, ĉar en tiu regiono la klimato estas tre humida.

Akbar rakontis al mi pri sia urbo, kiu enhavas 650 milojn da loĝantoj!



Sekvo en venonta numero

第67届国际轨道交通世界语大会暨第11届全国世界语大会


Varman gratulon al la 67-a IFEF-kongreso kaj la 11-a Ĉina kongreso de Esperanto



中国 昆明 2015年5月17日-23日



La 67-a IFEF-Kongreso



La 11-a Ĉina Kongreso de Esperanto
第11届全国世界语大会

昆明
Ĉinio
2015.5.23

Kunming - majo 2015

